
# NIA  PONTO


Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**OKTOBRO/DECEMBRO 2020** **Nro. 125 (4/20)**




## Ĉi-jare ni ne kunmemoros la naskiĝtagon de Zamenhof

Kiel vi eble jam supozis, ĉi-jare ni ne kuniĝos por kunmemori la naskiĝtagon de Ludwik Lazar Zamenhof, la kreinto (aŭ kiel li ŝatis diri, la iniciatoro) de Esperanto. Ni ne kunmemoros tiun 15an de decembro, kiu ĉiam estas grava tago por la esperantistaro laŭronde de la tuta mondo.

La koronaviruso kaj ĝia sekva malsano, KOVIM-19, malpermesas en Vaskujo la kuniĝon de pli ol ses personoj, eĉ la veturojn for de la propra municipo, almenaŭ kiam ni skribas tiujn-ĉi liniojn.

Ekde la hispana interna milito (1936-39) kaj sekva diktaturo, kiu malpermesis Esperanton, neniam okazis ion tian en nia E-Grupo de Bilbao, eĉ neniam ni antaŭvidis ke neokazigo de tiel kortuŝa renkontiĝo iam ŝuldiĝos al tiu eta kreskaĵo.

Sed ni pensu pri la venonta jaro, kiam supozeble jam estos vakcinoj kaj la vivo de ni ĉiuj, iom post iom, reiros al pli normala situacio. Ke tiel estu.

## Como supondréis, este año no celebraremos la tradicional "fiesta de Zamenhof" del 15 de diciembre.

**LOKE ...**

# KRISTNASKA LOTERIO.




Spite de la malfacilaj cirkonstancoj pro KOVIM-19, kelkaj el ni, almenaŭ ĝis nun, sukcesis malfermi la Grup-ejon ĉiuvendrede, inter la 19:30 kaj la 21:00 h. Kelkaj aliaj ne povis veturi al Bilbao el proksimaj municipoj. Do, estis problemoj.

Sed ni povis almenaŭ daŭrigi la disvendadon de la tradicia kristnaska loterio al tiuj, kiuj vizitis nin.

Kaj tiu vendado daŭrigas. Ni jam sendis kelkajn retmesaĝojn por memorigi pri tio. Kaj endas ripeti ke vi aĉetu kiel eble plej baldaŭ, unue ĉar ĉi-foje ni rezervis malpli ol kutime kaj, due, ni ne scias, pro KOVIM, ĝis kiam eblos vendi. La ĉi-jara numero estas **40.259**. **Ĉiu bileto kostas 5 €**, el kiuj oni lotludas 4 € kaj restas 1 € kiel donaco al la Grupo.

**Kaj memoru ke, kiel kutime, ankaŭ eblas aĉeti loterion per interreto**:

Por tio sekvu la jenajn paŝojn:

1. Enkontigu la monon en la konto de la Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN-kodo: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Sendu retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** informante pri la monenkontigo.
3. Ni sendos la skanitajn biletojn per retpoŝto. La originaloj restos en la E-Grupo de Bilbao.
4. Se la biletoj estus premiitaj, ni rekte sendus la monon al la bankkonto indikita de la aĉetinto, tute senpage por li aŭ ŝi.
5. Tiu, kiu volus ricevi la originalajn biletojn post la lotado, bv. sendi retmesaĝon al **esperantobi@gmail.com** kaj ni sendos ilin per normala poŝto al la adreso indikita de la aĉetinto.

**Como de costumbre, también se puede comprar la lotería de Navidad por internet.**

Para ello:




1. Hay que ingresar el dinero en la cuenta del Grupo Esperantista de Bilbao. IBAN: **ES56-2095-0141-4122-1800-1550**.
2. Hay que enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** dando cuenta del ingreso.
3. Enviaremos los billetes, escaneados, por e-mail. Los originales quedarán depositados en el Grupo de Bilbao.
4. Si los billetes resultan premiados, enviaremos el dinero, directamente, a la cuenta indicada por el comprador, sin gasto alguno para éste.
5. Quien quiera recibir los billetes originales, una vez realizado el sorteo, debe enviar un e-mail a **esperantobi@gmail.com** y se los enviaremos, por correo ordinario, a la dirección que se nos indique.

**LOKE ...**

## CUOTAS DEL AÑO 2020.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una “X”, es que **te has olvidado de hacer el pago de la cuota de socio de este año**. El número de cuenta donde hacer el ingreso, así como las cuotas vigentes, están en la primera página de este “Nia Ponto”.

## La 79a Hispana Kongreso prokrastita duafoje (Oficiala komuniko).




Laŭ la nova decido de la LKK, **la kongreso okazos de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo, 2021**.

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto, konsiderante la zorgojn rilate al la epidemio de kronviruso Kovim-19 kaj la rekomendojn de la ŝtataj kaj internaciaj aŭtoritatoj, decidis PROKRASTI la okazigon de la kongreso.

Post interkonsento kun la loka urbestraro de Comillas, ni decidis ke la kongreso okazos venontjare en la sama tempo, de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo.

La LKK provos konservi la tutan kongresan kaj postkongresan programon jam anoncitajn. Pri eventualaj modifoj aŭ anstataŭigoj oni informos dum venontaj monatoj.

**La LKK konsideras validajn ĉiujn aliĝojn ĝis nun faritajn**.

Se iu aliĝinto antaŭvidas jam nun sian neeblon partopreni la kongreson en la novaj datoj, bonvolu informi nin. Oni konsciu ke la LKK decidis unujaran prokraston, por havi la plenan certecon ke tiam ĉiuj cirkonstancoj estos favoraj por multhomaj aranĝoj.

**La LKK redonos sian aliĝkotizon al ĉiu, kiu ĝin petos**. Same ni redonos la pagojn faritajn por la rezervo de ekskursoj.

Bedaŭrinde, la LKK ne povos redoni aliajn kostojn (pri vojaĝoj, loĝigo, k.s.) kiujn la partoprenontoj jam elspezis. Tamen ekzistas la ebleco ŝanĝi la datojn de loĝado en la samaj hoteloj.

Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato daŭre informos pri la evoluo de la kongreso per siaj retejoj, sociaj retoj kaj aliaj komunikoj. Ĉiun demandon oni plu povas sendi al la adreso de la LKK kongreso@esperanto.es.

HEF kaj la LKK bedaŭras la ĝenojn okazigitajn pro la decido kaj esperas vian komprenemon. Ni deziras bonan sanon al ĉiuj niaj amikoj en la tuta mondo, kaj esperas renkonti vin fine de aprilo de 2021 en Comillas.


*Pedro Ullate López*
*Sekretario de la LKK de la 79a Hispana E-Kongreso*
*07/08/2020*

## La Grupo estas malfermita.

Dum la registaro ne malpermesos tion, memoru ke la Grup-ejo estas malfermita, ĉiuvendrede, inter la 19:30 kaj la 21:00 h.

## H.E.F.

## Mortis Antonio Marco Botella.



La 3an de novembro forpasis en Zaragozo nia amiko Antonio Marco Botella.

Li naskiĝis en 1921 en Callosa de Segura (Alikanto), lernis Esperanton en 1937, 16-jara, dum la hispana milito kaj de antaŭ multaj jaroj loĝis en Zaragozo.

Partopreninte tiun hispanan internan militon ene de la tiel nomata “quinta del biberón” (“suĉbotela rekrutaro”) pro la aĝo de la rekrutoj (nur 15-jaraj!), kiam la trupoj de Franco konkeris la lastan parton de Hispanio, Antonio devis foriri, kune kun miloj de hispanoj el la haveno de Alikanto. De tie li navigis, en terure malfavoraj kondiĉoj, ĝis Orano (Alĝerio), kie tiuj hispanoj estis lokitaj en koncentrejo. Koncentrejo mastrumita de Francujo. “Por Francujo ni estis banditoj”, li diris. Frukto el tiaj spertoj estis lia libro “La odisea del Stanbrook”, nomo de la brita ŝipo en kiu li fuĝis.

Sed Antonio Marco estis la aŭtoro de diversaj libroj, kiuj igis lin ege fama inter la hispanaj esperantistoj. Ni substreku, ekz., “Analoj de la Esperanta movado en Hispanujo”, “Lirikaj perloj de Al-Andalus”, “Laboristaj kronikoj”, aŭ “Hispana lirika antologio”. Li ankaŭ estis, dum multe da jaroj, redaktoro de “Boletín” de HEF kaj prezidanto de “Fundación Esperanto” (“Fondumo Esperanto”), kies sidejo troviĝas en Zaragozo. Li restos porĉiam en nia memoro.

## Nova estraro de HEF.



La 18an de oktobro 2020 Hispana Esperanto-Federacio okazigis Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kies ĉefa tagordero estis la renovigo de la estraro, pro fino de la deĵorperiodo de la antaŭa.

*Sur la maldekstra foto, la nova HEF-Prezidanto, **Ángel Arquillos**, ĉirkaŭata de lia edzino kaj esperantistoj de Bilbao. En la suba dekstra foto, parto de la nova estraro.*

La nova estraro estis elektita unuanime, kaj konsistas el jenaj homoj:

Prezidanto: **Ángel Arquillos López** (Málaga)
Vicprezidanto: **Alberto Granados Orcero** (Teruel)
Sekretario: **Manuel Parra Benito** (Madrid)
Vicsekretario: **Isidoro Ortega López** (Fuenlabrada)
Kasisto: **Jesús M. García Iturrioz** (Portugalete)
Voĉdonantoj: **Vicente Manzano Arrondo** (Sevilla)
**Ana Manero García** (Madrid)
**William Guerrero D’Azevedo**(Madrid
(*Prezidanto de HEJS-junulara sekcio*)



## Forpasis ankaŭ Manuel López Hernández.

La 6an de oktobro en la urbo Moguer (provinco Onubo-Huelva) forpasis Manuel López Hernández, naskiĝinta, kiel Antonio Marco, en Callosa de Segura (Alikanto), dum multaj jaroj centro de granda esperantista vivo, en novembro 1956.

Li estis filo de Manuel López Serna, tre konata kaj aktiva esperantisto kiu instruis la internacian lingvon al siaj filoj jam infanaĝe. Profesie li estis instruisto; post kelkaj jaroj en Galegio li translokiĝis al Sevilo, kie li aktive agadis en ties esperantista movado.

Inter 1989 kaj 1993 li fariĝis sekretario de Hispana Esperanto-Federacio. Ĝuste li estis nomumita por tiu posteno en la kongreso okazinta en Bilbao, en la ekonomia Fakultato de Sarriko. Poste li iris labori al Moguer kaj restis membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU) kaj de Hispana Esperanto-Federacio.

La andaluzia E-asocio sendis delegiton kaj funebran kronon por omaĝi lin.

*(El fejsbukejo de Andaluzia E-Unuiĝo)*

## Helpoj de Fondumo Esperanto.

Kelkaj el vi eble ne scias ke ekzistas fondaĵo nomata, “Fundación Esperanto”, kun fizika sidejo en Zaragoza (Hispanio). Ĝi estis starigita en 1969 de la Rektoro de la Zaragoza Universitato, D. Miguel Sancho Izquierdo, tiama prezidanto de HEF.

Ĝia celo statute estas “stimuli la instruadon kaj disvastigon de la internacia lingvo Esperanto”. Kelkfoje ĝi helpis al nia E-Grupo de Bilbao, ĉefe kiam ni travivis ekonomiajn malfacilaĵojn, sed ne nur. La mondonacojn al “Fundación”, fare de privatuloj, rajtas fiskajn avantaĝojn.

Nu, ankaŭ ĉi-jare “Fundación Esperanto” anoncis sian kunvokon de helpoj por projektoj faritaj dum la jaro 2020. Oni subvencias ĉefe la instruadon kaj disvastigadon de Esperanto. Tio povas inkludi, ekz., organizadon de kursoj, eldonon de libroj en aŭ pri Esperanto, realigon de E-eventoj kaj simile. Eblas fari sugestojn kaj proponojn.

Oni kalkulas ke la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 400 €. La petoj devos esti ricevataj antaŭ la 30a de novembro 2020, pere de la retadreso fundacion@esperanto.es.

*(El “La Bitbulteno” de HEF. Nro. 70. Nov. 2020)*

## Kial ne aliĝi AL HEF POR 2021?

Hispana Esperanto-Federacio (HEF) malfermis jam sian novan kampanjon de aliĝo al la asocio por la jaro 2021. Vi povas aliĝi jam kaj komenci ricevi nian paperan bultenon, inklude de tiuj restantaj de la jaro 2020. Trovu la retan aliĝilon ĉe: http://www.esperanto.es/inscripcion.

Memoru ke aliĝi al la Federacio havas avantaĝojn, inter ili rabaton en kelkaj libroj kaj aliaj materialoj de la libroservo kaj ankaŭ memoru ke la kotizoj kaj donacoj al HEF ĝuas fiskajn avantaĝojn: en Bizkajo, en via impostdeklaro (IRPF), vi rajtas demeti 30% de la HEF-kotizo el viaj impostoj (Tio rekte aperos en via deklaro).

Ni atendas vin; apogu la novan estraron kaj aniĝu!

*(El « La Bitbulteno » de HEF. Nro. 70. Nov. 2020)*

**H.E.F.**

## La reta biblioteko de HEF.

Kelkaj esperantistoj ankoraŭ eble ne aŭdis pri la ekzisto de reta biblioteko de HEF en https://www.esperanto.es/hef1/index.php/komenco. Ni kopias la prezenton, kiun oni povas legi en la antaŭa retadreso:

Nia biblioteko celas doni aliron al ĉiaspecaj bibliografiaj materialoj jen verkitaj en esperanto, jen iel rilataj al esperanto kaj ĝia kulturo eĉ se verkitaj en aliaj lingvoj.
Jen la ĉefaj servoj, kiujn ni metas je via dispono:

- Aliro al **retkatalogo** de nia biblioteko.
- Aliro al **Bitoteko**
- **Tradukoteko**, aliro al la bibliografia datumbazo pri hispana literaturo tradukita en esperanton.
- Aliro al la retkatalogoj de **aliaj bibliotekoj**, kiuj disponas dokumentojn rilatajn al esperanto.
- Aliro, pere de nia **virtuala biblioteko**, al ĉiaspecaj bitdokumentoj (vortaroj, enciklopedioj, revuoj, libroj...).
- Informoj pri la **ekspozicioj** organizitaj de la biblioteko.
- **Dulingva informado** pri la biblioteko kaj ties diversaj servoj.
- Bibliotekista helpo pere de la **bibliotekistejo**.

Ĝuinda trezoro, kiun vi povas malkovri!

## BITOTEKO renovigita.

La bita arkivo de Hispana Esperanto-Federacio ricevis dum pasintaj monatoj gravan renovigon, teknikan kaj forman.

Bitoteko apartenas al Europeana, la bita arkivo de Eŭropa Unio, ekde 2013. Por tion atingi, Hispana Esperanto-Federacio subskribis siatempe kontrakton kun la tiama Ministerio pri Edukado, Kulturo kaj Sportoj, per kiu HEF cedis la utiligon de siaj metadatenoj kaj devigis sin adaptiĝi al la teknikaj postuloj de Europeana.

Komence, la afero estis relative simpla, sed la informadika medio evoluas rapide kaj Europeana decidis ankaŭ evoluigi la manieron mastrumi la metadatenojn ricevitajn el la diversaj kulturaj institucioj tra Eŭropo, kun la celo unuecigi la malsamajn modelojn de metadatenoj uzitajn de ili. Tio devigis nin je granda teknika penado, kaj HEF devis dungi specialigitan entreprenon.

La laboroj komenciĝis fine de marto kaj, parte pro la pandemio, ili daŭris ĝis septembro. Ni profitis la okazon por fari aliajn plibonigojn kaj por ŝanĝi la fasonon kaj aspekton de la Bitoteko. Jen do Bitoteko denove preta kaj je via dispono. Aliru la kutiman adreson https://bitoteko.esperanto.es/ … kaj profitu ĝin!

*(El "La Bitbulteno" de HEF. Nro. 69. Okt. 2020)*

## TRA LA MONDO …

### Nova Estraro de TEJO.




La junulara sekcio de UEA havas novan estraron, kiu oficas ekde la komenco de septembro, post unu-monata transira periodo, en kiu la nova kaj la antaŭa estraroj kunlaboris por la pluiro de la unuopaj laborterenoj.

Jen la listo kun la loĝlandaj indikoj kaj la ĉefaj respondecoj:

Prezidanto: Charlotte Scherping Larsson, DE, kunordigo, eksteraj rilatoj
Vicprezidanto: **Carlos Pesquera Alonso**, ES, Kongresoj, Interkontinentaj projektoj.
Vicprezidanto: Tomáš Stano, SK, Aktivula Trejnado, Eŭropaj Projektoj
Ĝenerala Sekretario: Konstanze Schönfeld (Tuŝka), DE, eksteraj rilatoj.
Kasisto: Mung Bui, VN, (Feliĉa), financoj.
Estrarano: Karina Oliveira, KR, Edukado, Scienco kaj Kulturo
Estrarano: Klára Ertl, LU, Talento, rilatoj kun UEA.
Estrarano: Rogier Huurman (Roĉjo), NL, Merkatiko kaj informado
Estrarano: Robert Nielsen, IE, landa kaj faka agado

### La E-kulturdomo kastelo Greziljono produktigis siajn proprajn maskojn.

La franca Esperanto-kastelo Greziljono produktigis sian propran maskon, lavebla kaj laŭnorma. Eblas mendi ĝin kontraŭ 9 eŭroj, pere de la retadreso kastelo@gresillon.org
La surskribo instigos homojn demandi vin pri la signifo, do informi pri Esperanto.
Senkoste ricevos ĝin, kiu aliĝos al ĝiaj staĝoj.




*Unua versio de la masko, jam elĉerpita.*




*Dua versio de la masko.*

## Raporto pri la trinkaĵo "MIRINDA".

La ĵurnaloj de la hispana gazetargrupo “Vocento” publikigis novan artikolon kun mencioj al Esperanto, ĉifoje pri la historio de la trinkaĵo nomata “Mirinda”. Temas pri nealkoholaĵo lanĉita en Hispanio, poste disvastigita al multaj landoj, sed kurioze, apenaŭ havebla nun en la lando de naskiĝo.

La nomo venas klare el Esperanto, sed la apero kaj la rilato al la lingvo internacia estas iom mistera, laŭ la raporto. Ĉu indus pluaj esploroj en esperantaj arkivoj kaj publikigaĵoj?





*(El “La Bitbulteno” de HEF. Nro. 69. Okt. 2020)*

## Reta PIV.

Laŭ informo el “*Esperanto en marche*” (trimonata revuo de APE / Asocio Por Esperanto – Belgio; aŭtuno 2020), eblas nun konsulti rete la novan ***PIV / Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020*** ĉe **www.vortaro.net**

(Germain Pirlot. 30/10/2020)




## Ĉu vi deziras korespondi?

Se vi deziras korespondi, kontakti aŭ paroli kun aliaj esperantistoj en la mondo, ekzistas diversaj eblecoj. Ekzemple, koresponda servo universala:

http://esperanto-plus.ru/koresponda-servo/

Aŭ Esperanto Koresponda Servo: http://esperantofre.com/eks/

**LA “Grupo ESPERANTISTA de Bilbao” DEZIRAS AL VI ĈIUJ KE LA JARO 2021 ESTU PLI SUKCESA KAJ FRUKTODONA OL LA FINIĜONTA KAJ TERURA 2020.**